

LA ESPERO

Organ för Esperantorörelsen
i Sverige

Utgiven av Förlagsföreningen
Esperanto u. p. a.

OFICIALA ORGANO POR SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO (S. E. F.)

11a Jaro
N:o 5

Redaktör: HENNING HALLDOR.
Ansvarig utgivare: W. WAHLUND.
Prenumerationspris: Helt år kr 3:50.
Lösnummerpris: 35 öre.
Annonsspris: 10 öre pr mm.
Redaktionens och expeditionens adress
Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1.

Redaktanto: HENNING HALLDOR.
Responda Eldonanto: W. WAHLUND.
Abonprezo eksterlanden: sv. kr. 4:50.
Prezo po numero: 35 oeroj.
Anonprezo: 10 oeroj po milimetro.
Adreso de redakto kaj ekspedico:
Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Svedujo.

Majo
1923

Esperantistaj impresoj el vizito en Rusujo.

De VALDEMAR LANGLET.

En junaj jaroj fervora esperantisto, redaktoro de la sola esperanta gazeto dum kelkaj malfacilaj jaroj, mi post tiam dum unu kvarono de jarcento preskaŭ neniam uzis nian lingvon kaj perdis ĉian kontakton kun la esperantista mondo de post la jaro 1906 (la kongreso en Ĝenevo, kiam mi vidis d:ron Zamenhof je la unua kaj lasta fojo).

Alveninte en Moskvon je tiu ĉi jaro en monato februaro, mi ekhavis du spertojn sufiĉe interesajn kaj unu grandan ĝojon. Tiu lasta estas mallonge rakontota: mi revidis esperantistan amikinson de la jaroj 1895-6, Antonina Justinovna Borovko, naskita Ĉajkovskaja; ŝia edzo, mia bonega amiko, sufiĉe konata esperantisto de l' komenco de la movado, Nikolaj Afrikanoviĉ B., estis morta antaŭ dek jaroj, sed mi havis la plezuron konatiĝi kun ilia 24-jara filio, ĉarma kantistino, kiun mi esperas povi enkonduki en la svedan esperantistaron dum la estonta vintro.

Miaj du interesaj spertoj estas la jenaj:

1:a ke homo, kiu unufoje posedis la lingvon, memoras ĝin kaj povas ĝin facile uzi ankaŭ post pli ol 20 jaroj, kvankam ne parolinte, ne skribinte, eĉ leginte preskaŭ neniun vorton dum la tuta tempo — bona argumento por nia lingvo, se oni memoras, ke ĉiu alia lingvokonado, ne uzita, malaperas sufiĉe rapide.

2:a sperto: la lingvo Esperanto estas en la nuna Rusujo sufiĉe bone konata; mi trafis dum mallonga estado en Moskvo multajn personojn, kiuj tute posedis Esperanton kaj parolis ĝin egale flue kiel sian gepatran lingvon.

Interesa ekzemplo estas la sekvanta. Mi sonorigis telefone unu tagon al amiko en "Vtsik" — tutrusia centra ekzekutiva komi-

tato (t. e. kancelario de la sovjeta estraro). Oni false kunligis — tielo okazas ne nur en Stockholmo, sed ankaŭ, kvankam malpli ofte, ĉe la svedkonstruita Moskva telefono! — kaj respondis "ja slusaju" tute alia persono. Mi tamen kredis, ke mia amiko tie estas, kaj komencis paroli en Esperanto. Je la alia fino de la telefona fadeno oni tuj respondis ankaŭ en Esperanto, ke la sinjoro, kiun mi serĉas, havas alian numeron, kaj oni donis tiun numeron. Kompreneble, mi tre dankis kaj iom miris, ke oni tiel estas servata en nia lingvo per tute fremda persono!

Nu, mi dum la semajnoj pasitaj en Moskvo, kompreneble, uzis nian lingvon laŭeble multe.

Unu tagon trairante straton en la proksimaĵo de mia loĝejo mi vidis la verdan ŝildon kun stelo: Esperantista librejo. Mi eniris kaj konatiĝis kun sinjoro Alexandro Prager, tre konata esperantisto, kiu multe faris kaj faras por la disvastigado de la lingvo. Ekzemple li fondis grupon en la antaŭurbeto Saltykoska, kie li somerloĝas kaj kien li min invitis. Li aranĝas esperantistajn kunvenojn kaj koncertojn, vendas kaj disdonas esp. librojn, poŝtkartojn ktp. Lia magazeno estas kvazaŭ esperantista centro. Al mi li montris interesajn flankojn de la rusa nuntempa vivo kaj donis konsilojn kaj sciigojn.

Interalie li min konatigis kun s:ro A. Postnikov, la frato de mia malnova bonega amiko F. Postnikov, nun loĝanta en Ameriko. S:ro P. parolis Esperanton tute libere, ankaŭ lia edzino ĝin iom posedas, kaj mi pasis ĉe ili tre agrablan kaj interesan vesperon.

La plej grandan utilon s:ro Prager faris

al mi, min konatigante kun s-ro E. Dresen, la vicestro de Vtsik. Ni vizitis lin en lia administrejo — kaj li mirigis min multege, komencante nian kunestadon per mallonga rakonto pri — mia propra laboro por la esperanta afero. Li sciis precie ĉiun parton de mia esperantista vivo, sciis pli bone ol mi mem, ŝajnis, la datojn de miaj vojaĝoj kaj mia redaktado, estis leginta ĉion, kion mi skribis, kaj li posedis cetere tute plene kanon libron ne nur de la esp. eldonaĵo sed, verŝajne, de ĉio ajn publikigita pri kaj en internaciaj lingvoj en nuna tempo.

S-ro Dresen fariĝis mia bona anĝelo dum la estado en Moskvo. Kvankam konvinkita komunisto kaj alta oficisto en la regnestro li montris al mi, malkredulo, dekstopolitikisto, la plej grandan amikecon kaj afablecon; mi ofte vizitis lian hejmon — li loĝis kun sia aminda edzino (kantistino) en unu ĉambro kaj vivis laŭ nia vidmaniero tre simple, kio montras, ke la rakontoj pri la luksa vivo de la gvidantaj komunistoj estas fabloj — mi povas aldoni, ke mi vidis nenion de ĝi; mi konatigis kun Litvinov, Radek kaj du popolkomisarioj (por la instruado kaj por la poŝto kaj telegrafo), plue kun la vicestro mem de Vtsik, s-ro Smidoviĉ, kun la estro de la ŝtata banko ktp.; kaj mi devas diri, ke neniu el ili donis al mi impreson de luksa vivo; mi ankaŭ eksciis, ke la salajroj estas laŭ nia vidpunkto tre modestaj.

Nu, s-ro Dresen konatigis min kun multaj interesaj flankoj de la administrado, kaj krom tio kun la Moskvaj teatroj, kie oni ludas, kantas kaj — dancas tiel bone, ke oni devas diri, ke ili staras en la unua rango, precipe la opero kaj la baletoj. Li ankaŭ enkondukis min en la Moskvan klu-

gvidis la tuton per lerteco de malnova spertulo.

Cetere la plejmulto el la kursanoj efike kaj bone kunagis por fari la kunestadon agrabla. — Jen floro el dankema koro al la knabinoj por ilia vere ĉarma, harmonia kantado!

Pri la kurso mi nur povas diri, ke ĝi bonege sukcesis. Estas vera plezuro gvidi kursanojn kun tiaj lernantoj! Kiel kursgvidanto mi do havas ĉian kaŭzon esti kontenta. Sed — estas grava sed! — ĉiuj ankoraŭ ne aliĝis al la klubo. Vi devas kompreni, karaj amikoj, ke "La Stelo" bezonas vin kaj vian samideanan solidarecon!

Specialan ĉapitron meritas nia pliaĝulo, li supre nomita F. A. Pettersson, kvankam li jam eniris sian sesdekan jaron, lernas nian lingvon kun bona sukceso. Mi eĉ povas diri, ke li staras en la unua vico de la lernantoj, diligenta, tre studema kaj fervore laborema por nia afero. Vere, li evidente pravas, ke la homo ne ĉiam malunigas kun la jaroj!

Por eviti la redaktoran tondilon mi finigas mian raporton ĉi-tie, aldonante ke la kursanoj honorigis la kursgvidanton per belega florkorbo kaj ke la festeneto finiĝis nur ĉe la noktomezo en plej ĝoja humoro.

Āg.

Malmö. La klubo esperantista de Malmö kunvenis la 24-an de aprilo en kafejo Bristol. Dum la vintro okazis tri kursoj, el kiuj du estis por komencantoj. Tiuj estis aligitaj al A. B. F. Kelkaj partoprenintoj de la kursoj tre bone laŭlegis kaj tradukis kelkajn esperantajn legaĵojn. Por aranĝi la somerajn kunvenojn, kiuj kutime okazas en libera aero, oni elektis la jenan komitaton: s-oj M. Carlsson, Ernst Andersson kaj Alex. Thörn. Fraŭlino N. Gustafsson kaj s-ro N. Mårtensson kontribuis al la amuzado de la ĉestantoj per bela pian-kaj violinludo, s-ro Albert Engström kantis svede kaj esperante kaj s-ro Ernst Andersson deklamis.

La bone vizitita kunveno, al kiu ĉiuj kurspartoprenantoj estis invitataj, estis bela fino de la dumvintira laboro.

E. A.

Mockfjärd. La ĉi-tiea esp.-kurso finiĝis la 16-an de aprilo. Ĝis la fino restis nur deko da kursanoj, sed tiuj estas nun relative lertaj, kaj certe ilia intereso por la lingvo daŭros. Samtempe fondiĝis esp.-grupo. La estraro konsistas de: prezidanto Em. Söderlund, sekretario Arv. Lindberg, kasisto Torsten Dahl.

La grupo havas kunvenejon en la foto-grafejo de la prez.

E. S.

Esperanto en Finnlando.

La jarkunveno de Esperanto Asocio de Finnlando okazis la 24-an de marto 1923 en Helsingfors. Aliĝis entute 84 personoj, kvankam nur 30 partoprenis la laborkunveno. La kunveno malfermis la prezidanto de E. A. F., s-ro Albin Sandström, kiu ankaŭ estis elektita prezidanto de la jarkunveno. La Asocio parte reorganizigis jene:

1:e) la Asocio daŭrigos sian agadon neutrale ĝis kiel nun,

2:e) kalkulte de la jarŝanĝo la Asocio transdonis la posedatan de ĝi Esperanto Instituton de Finnlando al novefondota memstara institucio, kiel direktoro de la Instituto daŭre funkcios s-ro Vilho Setälä,

3:e) la gazeton "Esperanta Finnlando" la Asocio samtempe transdonis al la Instituto, kiu daŭrigos ĝian eldonadon kiel senpartia organo de esperantomovado en Finnlando.

Cetere dum pliparto de la pasinta agadjaro la intereso de la finnlanda samideanaro plene absorbis la antaŭpreparojn por la okazinta en Finnlando XIV-a Universala Kongreso de Esperanto. La jarraporto plue konstatis la ĝojigan fakton, ke la Direkcio de la Finnlanda Foiro daŭre montras grandan intereson por nia afero. La Foiro fondis specialan esperantan sekretariejon kies gvidanto estas s-ro Ojala, kaj uzas en sia eksterlanda propagando plejparte esperanton. En decembro la parlamento denove voĉdonis subvenciojn da Fmk. 25,000 por la jaro 1923 al la Esperanto Instituto de Finnlando.

Post unuanima senrespondigo de la estraro sekvis novaj elektoj. Kiel prezidanton oni reelektis unuanime direktoron Albin Sandström. Kiel ceteraj estraranoj estis elektitaj: s-roj lektoro K. Sev. Ahonius, inĝeniero S. Attila, komercisto Arvo Joh. Ahti, direktoro Leo Jalava, kontoristo K. Ojala, kontoristo G. Černohvostov, studento Erik Gadd kaj fraŭlino Aline Sandström, ĉiuj el Helsingfors, kaj s-ro Hugo Salokannel el Laihia kaj s-ro Oskari Eriksson el Viborg.

Från Expeditionen.

Till dem, som ännu icke erlagt sin avgift för innevarande år ha cirkulär utsänts. Skulle genom misstag någon, som redan betalt, erhålla ett dylikt, anhåller exp. om benäget överseende därmed. Så snart meddelande erhålles, skall felet rättas.

Det synes icke vara många som uppmärksammat annonsen i föregående nummer om att den nya broschyren "Nationernas förbund om internationellt språk" utkommit. Endast några få beställningar ha kommit. Denna ofantligt värdefulla skrift måste spridas i stort antal. Lagg märke till, att i bokhandeln kostar den 1 krona, men att vid rekvisition från förlagsföreningen erhålles samma broschyr med enklare omslag för 50 öre.

Vi fästa uppmärksamheten på de prisändringar å vissa böcker, som tillkännagivas i särskild annons å annat ställe i denna tidning.

Ĉu vi atentis la komunikon en la numeroj 3 kaj 4 pri senpaga korekto de verkaĵoj kaj tradukoj?

Ĉu vi atentigas viajn konatojn pri la notoj priesperantaj kiujn ofte enhavas la ĵurnaloj?

Tiuj, kiuj ankoraŭ ne ensendis al s-ro Harald Skog, Ystad, tradukon de la tasko donita en numero 4, faru tion senprokraste! Uzu tiun bonan okazon perfektigi en la scio de nia lingvo.

Korespondado.

Adresojn de korespondantoj senpage publikigas "Esperantsky zpravodaj", Praha II. — 2032.

XV-a Universala kongreso de Esperanto en Nürnberg

2—8 Aŭg. 1923.

5:a cirkulero.
(Eltirajo.)

1. **Protektoreco.** Lia Moŝto, prez. de la Germana Respubliko, Friedr. Ebert, bonvolis akcepti la honoran protektorecon por la XV-a.

2. **Aliĝoj.** Aliĝis ĝis fino de aprilo 2,910 kongresanoj el 36 landoj. Diversaj eksterlandaj samideanoj hezitas la aliĝadon, timante personajn malfacilaĵojn dum vojaĝo kaj restado. Ni rapidas konstati, ke ne estas kaŭzo por tiaj timoj.

3. **Financoj.** Ni preferas ricevi la kotojzojn el eksterlando per monbiletoj.

4. **Fakkunsidoj.** Estas plue anoncitaj la jenaj fakkunsidoj:

a) Univ. Esp. Asocio Junulara; b) Vegetara Ligo Esperantista; c) Katolikoj; d) Int. Ligo de Esp. Postoficistoj (Ilepo); e) Franka Esp. Ligo; f) Framasonoj; g) Instruistoj; h) Kursgvidantoj; i) Eksmilitintoj kaj militviktimoj; k) Interfoira Komisiono.

5. **Kongreslibro.** La presado de la kongreslibro komenciĝis.

6. **Postkartoj.** Belaj ilustr. postkartoj pri Nürnbergaj vidindaĵoj kun Esp. teksto jam nun estas livereblaj kontraŭ antaŭpago. La prezoj (inkluzive sendkostoj) estas por 30 div. kartoj 4000, por 15 kartoj 2500 gmk.

7. **Kongresaranĝoj.** En la kadro de la oficiala programo okazos: teatraj prezentoj de "Natan la Saĝulo" de Lessing kaj de la Mozarta opereto "Bartlen kaj Bartenne", internacia kostumbalo, komuna tuttaga ekskurso al Rothenburg (mondkonata mezepoka juvelujo). Laŭ deziro ni aranĝos postkongresajn ekskursojn al München (Alpo) kaj Leipzig.

8. **Vivkostoj.** Ni ricevas ĉiutage demandojn pri la lokaj prezoj por loĝado kaj manĝado. Pro la malstabileco de la cirkonstancoj estas neeble starigi jam hodiaŭ definitivan dumkongresan prezaron. La nuntempaj tagkostoj estas (sen trinkaĵoj): unuaranga hotelo 50000, duaranga hotelo aŭ komforta privatloĝejo 25000, bona privatloĝejo kaj manĝado en restoracio 12000, komuna manĝado kaj dumnoktado 5000 gmk.

9. **Vojaĝkostoj.** Ĉar la somera horaro aperos en la venontaj semajnoj, ni povas publikigi ĉiujn rilatajn detalojn nur en nia juna cirkulero.

10. **Blinduloj.** Aliĝis por la III-a ĝis nun 88 partoprenantoj el 12 landoj.

11. **Policianoj.** Laŭ interkonsento kun la prov. direktoro de Tutmonda Polica Ligo, la LKK prenis sur sin ankaŭ la lokajn preparojn por tiu ĉi fakkongreso.

LOKA KONGRESA KOMITATO.

Libroj kaj Gazetoj.

Rezenkotaj libroj estu sendotaj en *du* ekz.

"Nationernas Förbund om Esperanto som Internationellt hjälpspråk" (La Ligo de Nacioj pri Esperanto kiel internacia helplingvo). Sveda traduko de tiu volora dokumento aperis ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1. Ricevebla post ensendo de 50 oeroj plus sendkostoj (eksterlanden 10 oeroj).

Ny litteratur.

E. Privat: *Historio de la lingvo Esperanto.* Pris kr. 1:05. En intressant och nyttig bok för varje esperantist.

W. Lippmann: *Dr. Zamenhofs sprachliche Gutachten.* Kr. 1:—.

Åter har inkommit:

Internacia Mondliteraturo, delarna 1, 4, 7, 8, 9. Pris pr del 0:85. En värdefull serie esperantoöversättningar av världslitteraturens mästerverk.

H. Luyken: *Stranga heredaĵo.* I enlighet med förläggarens bestämmelser höjes priset å denna bok till kr. 3:50 för inb. och kr. 2:80 för häftat ex.

P. Benneman: *Tra la mondo* kostar numera för del I kr. 1:05 och del II 1:75.

Internacia kantaró, Textaro, 0:40.
D:o, Musikuppl., inb. 1:75.

INGEN esperantist

får underlåta att skaffa sig den nya broschyren

Nationernas Förbund om Esperanto som internationellt hjälpspråk.

Det viktigaste dokument esperantisterna hittills haft i sina händer. Erhålles mot insändande av **50 öre** + porto 5 öre.

Förlagsföreningen Esperanto Stockholm 1.

Sprid denna broschyr bland Edra bekanta!

VI PAROLAS pri centmiloj da Esperantistoj. Pruvo ke estas almenaŭ dekmil. UEA bezonas dekmil membrojn. Aliĝu al UEA!

Lokaj grupoj de Sveda Esp. Federacio.

Arvika.

Arvika Esperantoförening.
Prez.: Herman Andersson, Haga 37.
Sekr.: Alf. Blomster, Haga 153.

Eskilstuna.

Klubo Esperantista "La Stelo".
Prez.: Gunnar Eriksson, Stenkvistav. 27.
Sekr.: Eskil Johansson, Telefonst.

Falun.

Falu Esperantoförening.
Prez.: G. Johansson, S'lussen 10.
Sekr.: V. Bonde, Stenslund.

Gävle.

Gävle Esperantoförening.
Prez.: Gimnazia instruisto E. Beckman, N. Kungsgat. 13.
Sekr.: H. Norgren.

Göteborg.

Göteborgs Esperantoförening.
Prez.: Eric Höglund, Ö. Hamngatan 20.
Sekr.: Hans Rydbo, Grönsakstorget 2^o

Harnäs.

Harnäs Esperantoförening.
Prez.: G. Bäckström.
Sekr.: B. Larsson.

Ludvika.

Grupo Esperantista de Ludvika.
Prez.: Bernh. Eriksson, Ludvika Boktr.
Sekr.: E. Lundin, Box 429.

Malmö.

Malmö Esperantoförening.
Prez.: Lorentz Jönsson, Eriksfält, Kulladal.
Sekr.: John Peterson, Agnesgatan 1.

Motala.

Motala Esperantoförening.
Prez.: Carl Seger, Gröndal, Holen, Motala.
Sekr.: Erik Ahl, Box 24, Motala verkst.

Nynäshamn.

Nynäshamns Esperantoklubb.
Prez.: Karl Karlsson, Villagatan 33, Nynäsgård.
Sekr.: J. Eklund.

Sandviken.

Sandvikens Esperantoförening.
Prez.: Ivar Hammarberg, Olsbacka 4.
Sekr.: Joh. Gärund, Storgatan 10.

Sigtuna.

La Idilio.
Prez.: Karl Karlsson, Klappslätt, Sigtuna.
Sekr.: Arvid Ledin.

Stockholm.

Stockholms Esperantoförening.
Prez.: Paul Nylén, Hudänge.
Sekr.: L. Tell, Fleminggat. 20.

Sysslebäck.

Brattnöns Esperantoklubb, Sysslebäck.
Prez.: Ante L'son Antee, Sysslebäck.
Sekr.: Oscar Jönsson, "

Ludvika Boktryckeri 1923

Tingsryd.

Tingsryds Esperantosällskap.
Prez.: E. Sandqvist, Box 41.
Sekr.: Fröken Eisa Rooth.

Västerås.

Klubo Esperantista La Verda Stelo.
Prez.: O. N'son Ihrborn, Utanbyg. 14.
Sekr.: O. Dahrné, Lunda vägen 20.

Örnsköldsvik.

Örnsköldsviks Esperantoförening.
Prez.: A. Östman, Nygatan 24.
Sekr.: nekonata.

Örebro.

Örebro Esperantoförening.
Prez.: Oskar Johansson, Telefonst.
Sekr.: Erik Carlén, Drottninggat. 38 b.

Svenska Esperanto Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1

har till uteslutande ändamål dit mellanfolkliga hjälpspråkets utbredande och befrämjande.

Årsavgift för fristående medlemmar kr. 5:50 inberäknat prenumerationsavgiften för La Espero.

Förlagsföreningen Esperanto

u. p. a.

(Eldona Societo Esperanto s. p. r.)

Adress: Stockholm 1

tillhandahåller all slags esperantolitteratur, utger La Espero. Prislista och provnummer sändes gratis och franko.

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet.

Adress: Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1,

utkommer en gång i månaden. Prenumerationspris inom Sverige 3:50. Annonspris 10 öre pr mm.

Prenumeration å veckofidningen

ESPERANTO TRIUMFONTA

mottages av

Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1
Pris 1/1 år 12:— sv. kr., 1/2 år 6:—, 1/4 år 3:—
Prenumeration kan börja när som helst.

Anslut Eder till

Svenska Esperanto-Förbundet

Stockholm 1

Årsavgift kr. 5:50, däri inberäknat prenumerationsavgiften för La Espero.

Insänd årsavgiften snarast möjligt!